

# ELNA - BULTENO

Oficiala Esperantlingva Organo de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, N-ro 20-21, Junio-Aŭgusto, 1973. Redaktis Karl Pov, 1014 Weymouth Avenue, San Pedro, CA 90732. Redaktetis R.T.Sandberg.

## SAT KONGRESAS UNUAFOJE EN NORD-AMERIKO

De la 30a de julio ĝis la 5a de aŭgusto ĉi jare okazis la 46a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda en Toronto, Ontario, Kanado. Tio ĉi estis la unua fojo, kiam tiu organizo, plej vaste konata al nemembroj kiel eldoninto de Plena Vortaro kaj Plena Ilustrita Vortaro, kongresis ekster Eŭropo. Ĝi estis pro tio relative modesta kongreso, kun 252 aliĝintoj kaj 208 efektivaj partoprenantoj.

La plej amase reprezentita nacio ĉe tiu sennacieca renkontiĝo estis ne Kanado aŭ Usono, sed Francujo, de kie venis sperte organizita karavano. Estis interese konstati, ke ne nur usonanoj havas problemojn ĉe la internacia elparolo. La francoj preskaŭ senescepte malkaŝis sian devenon per la litero r, kiun ili kutimas "gargari." Malpli ofte troviĝis emo akcenti la lastan silabon. Kaj tamen, la lingvo funkciis! Banala konstato por esperantistoj, sed tiel mirinda afero por tiom da internaciaj konferencoj, kiuj ne disponas tiun rimedon por interkompreniĝo tuthomara!

Okazis apartaj kunvenoj por la Junulfako de SAT, la abonantoj de La Juna Penso (junulfaka kaj frakcia organo de SAT), kvin frakcioj de SAT (mondcivilitanoj, sennaciistoj, liberecanoj, pacistoj kaj abundanoj) kaj eĉ --kiel oficiala programero!-- por la ĉeestantaj anoj de nia Ligo.

SAT en Britio kaj SAT-Amikaro kunlabore eldonis dulingvan (anglan-francan) flugfolion propagandan kiun la kongresanoj--precipe kelkaj gejunuloj--surstrate disdonis al la torontanoj. Ĉar karibedevenaj negroj konsistigas surprize grandan parton de la toronta loĝantaro, estas espereble, ke tiu agado helpas al estonta malpaliĝo de la meza haŭtkoloro de la nordamerika esperantistaro. La franclingva foliflanko malmulte utilis en Toronto, kie hungara, ĉeĥoslovakia, germana kaj japana etnoj pli rimarkeblas ol franca, sed oni intencis uzi la flugfolion ankaŭ ĉe la postkongreso en Montrealo.

Post longan kaj fundan pridikutadon faris ĉiuj interesataj kongresanoj, ellaboriĝis la Gvidrezolucio. Ĝi i.a. atentigas pri la Mondcivilitanoj, Amnestio Internacia kaj la propono de la itala socialista partio uzi nian lingvon por rilatoj kun alilandaj socialistaj partioj.

Unu rezolucio tekstis originale, ke la Kongreso "Kondamnas la eksplodojn de atombomboj fare de Ĉinio kaj Francio kaj energie protestas kontraŭ tiu polucio de nia atmosfero." Post diskutado, tio aliformiĝis jene: "Kondamnas ĉiujn atombombajn proveksplodojn kaj energie protestas kontraŭ tiu poluado." Oni ankaŭ decidis, ke la rezolucio "Rimarkis denove ke Esperanto taŭgas por pri-traktado de plej diversaj temoj kiel montrite en tiu-ĉi kongreso" igus la kongresanojn aspekti iom stultaj, ĉar tiu fakto estis jam tute evidenta antaŭ pli ol duonjarcento; do oni sangis al "Pruvis plian fojon..."ktp.

Okazis ankaŭ prelegoj (i.a. pri multinaciaj korporacioj faris Mark Starr kaj pri dulingvismo en Kebekio faris Kajmo Brent), interkultura kaj distra vesperoj, ekskursoj, forumoj kaj aliaj interesaj programeroj.

Bedaŭrinde, unu el la plej gravaj organizintoj de la kongreso, juna alta barbulo Briano McClafferty, povis ĉeesti preskaŭ nenion, ĉar li devis perlabori sian panon dum la kongresa semajno mem. La kongreso ŝuldas al li grandan dankon.

## PRI LA UEA KONGRESO EN BEOGRADO

ni atendas personan raporton de Jonathan Pool, kaj espereble ĝi aperos en la venonta numero.

## ELNA KUNSIDIS EN TORONTO

Pro la fakto, ke la ELNA-Kongreso okazos ĉe la fino de la jaro en Ĉikago, kaj ke ĉirkaŭ tridek ELNA-anoj ĉeestis la ĉi-jaran SAT-Kongreson en Toronto, oni decidis okazigi neformalan kunsidon tie. SAT afable permesis ne nur, ke tio okazu, sed eĉ ke ĝi estu oficiala programero. Kunsido de neŭtrala landa asocio aliĝinta al UEA kadre de SAT-Kongreso certe ne estas kutima afero.

Venis al tiu kunsido, kiu okazis vespere, la 30an de julio, dudek sep personoj. Inter tiuj sin trovis Mark Starr, Armin Doneis, Robert Bailey, ges-roj William Schulze, John Lewine, ges-roj Duncan Charters, Joseph Gamble, Karl Nell, George Lockhart, Maria Liwszyc kaj via redaktoro, Karl Pov.

Kompreneble, la kunsido rajtis fari nur sugestojn. Pri efektivigo de tiuj sugestoj devos decidi la estraro. Por ke ankaŭ la ĝenerala membraro povu reagi pri la sugestoj, precipe kadre la Ĉikagan Kongreson, jen resumo:

S-ro Doneis riproĉis, ke la organoj de ELNA (ĉi tiu Bulteno kaj la anglalingva Newsletter) elvenis nur sporade dum la jaro. Li emfazis, ke akurateco pli gravas ol amplekso. Oni ĝenerale aprobis planon venontjare aperigi unu dumonatan organon, kun esperanta kaj angla artikoloj, kaj jaran kajeron similan al Sen-nacieca Revuo por pli longaj, malpli novaĵecaj aferoj. Via redaktoro pretas redakti ĉu la tutajn ĉu la esperantan parton de la dumonata revuo, sed necesas alia persono por prizorgi la jara kajero. Volontuloj sin anoncu! S-ro Doneis petis, ke kursoj estu anoncataj en la organo. (Listo verŝajne aperos en la venonta numero. Statistikon pri tio kolektas la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto, do la redaktoro intencas preni la informojn el ties organo.)

Oni konstatis denove, ke la sola funkcia informservo en Usono estas tiu de ges-roj Schulze, kiuj volas liberigi de tiu peza ŝarĝo, kaj ĉiukaze intencas liberigi sin je la jaraĵo, eĉ se anstataŭuloj ne troviĝos. Vere necesas starigi centran oficejon por ELNA, kiu prizorgos informoservon, libroservon, kunordigon de landskala agado kaj eldonadon de organo. Sed por tio ELNA bezonas pli da mono, ol ĝi nun disponas. Sekvis do diskuto pri plialtigo de nia kotizo. Junulo pagu \$5 anstataŭ \$3, plena membro \$15 anstataŭ \$8. S-ro Charters eĉ proponis, ke plena membro pagu \$25, sed ke ekzistu ankaŭ ia suba kategorio kiu ankaŭ ricevos la organon kaj eksterlandan revuon, sed eble ne la jaran kajeron, aŭ eĉ ne havos voĉdonrajton. Tiun lastan sugeston oni malakceptis kiel pluto-kratiaĵon, sed la propono starigi ian superan kategorion kun apartaj privilegioj (ekz. rabato ĉe la libroservo) kaj pli alta kotizo ol la ĝenerala anaro povus pagi ŝajnas pripensinda. Ni ankaŭ serĉu monon ekster la movado, ĉe fondusoj kaj riĉaj filantropoj.

#### ELNA OFICIALE KUNSIDOS EN ĈIKAGO

iam inter Kristnasktago kaj novjartago. Ĉeestontoj povos dum la sama vojaĝo al Ĉikago ĉeesti ankaŭ la kunvenojn de la Modern Language Association. Pli da detaloj aperos en venonta numero. R. Kent Jones agas kiel peranto de hotelĉambroj en Ĉikago al ELNA-membroj kiuj deziras tian servon. Kontakto lin ĉe 3318 N. Lake Shore Dr., #801, Chicago 60657.

#### KASISTO KAJ TRI ESTRARANOJ

estos elektataj tri monatoj antaŭ la Ĉikago Kongreso. Balotiloj kaj biografiaj skizoj de la kandidatoj estos sendataj al ELNA-membro en septembro.

#### FLORIDO FLORAS

raportas Richard E. Wood.

Sukcesa semajnfino de kulturaj aranĝoj kaj aferkunsidoj okazis en luksa hotelo Pic 66 en la ĉeatlantika banurbo Fort Lauderdale sub aŭspicioj de la Universitato Fort Lauderdale kaj la Esperanto-Societo de Florido, de la 13a ĝis la 15a de julio 1973.

La programo konsistis el bonvenigo far de d-ro Stanley J. Drake, Prezidanto de la Universitato; laŭtleĝo de salutmesaĝo de Prof. Mario Pei, eminenta usona lingvisto, verkinto de 44 libroj--studoj pri lingvistiko, romidaj lingvoj, la monda lingvo-problemo ktp.--pri la nepra graveco de la studo de Esperanto en la nuntempo; referaĵo de Prof. Richard E. Wood pri "La Rolo de Fremdlingva Studo en la Lerneja kaj Universitata Kursaro"; kaj festparolado de d-ro John Lewine. Aliaj aranĝoj estis rapida enkonduka kurseto de Esperanto al klaso de elstaraj gelernantoj de la lernejo "Nova" de Fort Lauderdale, instruita de s-ino Gizella Giguère (Lernejo por Elstaraj Infanoj, Tampa, Florido) kaj d-ro Richard E. Wood, en la ĉeesto de la gepatroj kaj instruistoj de la infanoj; kaj surscenigo de la dramo Proksima Nekonato de la geaktoroj Zbigniew Dobrzynski kaj Kalina Pienkiewicz de la Pola Esperanto-Teatro.

#### LETEROJ AL LA REDAKCIO

El Richard E. Wood:

"Se vi scias la kvalifikojn por instru Esperanton en via stato...." (p.2, ELNA-Bulteno, aprilo 1973). Nu, tiuj varias laŭ la stato--ebria stato, fraŭla stato, semona stato....

Elekto....Vi ne enlistigis mian preferon: okazigi tutlandan komunan ELNA- kaj AAIE-kongreson samtempe kaj samurbe kiel la ĉiujara kunveno de MLA (Asocio pri Modernaj Lingvoj) kaj do de ties nunaj esperanta kaj interlingvistika sekcioj, la 27-an ĝis 29-a de ĉiu decembro.

Pri la deziro trovi ekvivalenton de la angla "Ms.", ŝajnas al mi suspektinde, ke tiu ĉi krio aŭdiĝas nur rezulte de antaŭa okazaĵo en la angla lingvo. Sed la evoluo de Esperanto ne dependas de la

angla lingvo, nek la esperanta kulturo de la anglalingva. Mi ĝis nun ne rimarkis similan vortserĉadon en la esperantistaj organoj de neanglalingvaj landoj. Same, mi ne rimarkis similan subitan ekfrenezigon en aliaj lingvoj kaj kulturoj (kiel la hispana, germana), kiuj fiere sendependas de la angla.

Pri la artikolo de S-ano Marble "Pri la tradukarto" mi ĝentile atentigu, ke "-is/-as/-os" ne estas la hindeŭropa verb-sistemo; ĝi estas la esperanta sistemo, kiu plene diferenciĝas kaj de la prahindeŭropa (kies temp- kaj aspektsistemo estis tute alia) kaj de la sistemo de la ĉefaj hindeŭropaj lingvoj (ekz. la angla kiu posedas nur pasintan kaj prezencan tempojn, sed nenian fleksiitan futuron; la rusa kun sufiĉe tipa hindeŭropa aspektsistemo; la hindia; ktp.). Kiel konate--kaj kiel bone montrite interalie de Prof. Julius Balbin dum la novjorka seminario, en sia strukturo Esperanto ne estas hindeŭropa lingvo.

Respondas Karl Pov:

Kompreneble, la sola supersigna panee de la lasta numero okazis ĝuste ĉe vorto, kie konfuzo eblas. Tio memorigas pri samideano kiu foje fieris en letero, ke ĉar li estas la sola esperantisto en sia urbeto, oni liveras al li ĉiun postafon kiu venas de sufiĉe fora mondoparto, eĉ se mankas adreso! Pri "Ms.", s-ano Wood bv. rigardi p. 110 de Esperanta mozaiko de nederlanda Akademiano F. Faulhaber, kiu konsilas uzon de "sinjorino" ĉe ĉiuj virinoj.

El Tomaso H. Goodman:

...Vi proponis ke en 1974 ĉiuj novaĵoj estu en la anglalingva ELNA Newsletter (kiu fakte, ĝis nun, ne ofte aperis) kaj ke iu (vi?) aperigu "pli longajn verkojn"...en "ĉiujara kajero, bele presita." Miscivolas ĉu tia aranĝo helpus la plejparton de la usona Esperantistaro (krom kelkaj verkoj). Ŝajnas al mi, ke la manko de bulteno au revuo kiu pli-malpli regule aperas (kaj en Esperanto) estos sufiĉe granda. Se vi kredas, ke sufiĉe da ELNA-anoj subtenos vian proponon--do provu ĝin. Sed mi kredas, ke la risko de malsukceso laŭ pluraj vidpunktoj eble necesigos reaperon de ia bulteno en Esperanto dum postaj jaroj. Do ni vidos, kaj se vi povos eviti la problemojn kiujn mi menciis--des pli bone!

Plej grava estas la starigo de oficejo por informado kaj libroj, ĉar ges-roj

Schulze baldaŭ ĉesos helpi. La problemo estas parte mona (kvankam ELNA probable havas iom da mono, kiel ĝi havis kiam ĝi pagis la oficejon en Novjorko) kaj parte laboristara. Eble ni (per speciale dissendita anonco) kontaktu ĉiujn ELNA-anojn por havigi al ni pli da mono (aŭ per speciala kaso aŭ per ĝenerala pligrandiĝo de la kotizoj) kaj pli da helpo (se ni ne havos sufiĉe da mono por dungii profesiulo(j)n ni bezonos ankoraŭ volontulo(j)n). La ELNA-ano respondecas pri sia progreso au malprogreso--kaj sen ĝenerala subteno nia afero neniam vere sukcesos. Mi esperas ke la situacio pliboniĝos post ne tro da tempo!

#### DEBATO PRI LANDAJ KONGRESOJ

Aperis voĉdonilo en la lasta numero por opiniesprimo pri la landaj kongresoj de ELNA. Frank Helmuth unue proponis diskutadon pri tiu afero, dirante, ĉe la Kalifornia Konferenco, ke kelkaj (ne necese li mem) opinias okazigon de landskala kongreso malŝparo de tempo kaj energio, ĉar ili estas ĝenerale tiel malamasaj, ke ili certe ne imponas al la publiko. Nur manpleno da samideanoj pretas vojaĝi al ELNA-Kongreso ekster sia propra regiono.

Tiuj kontraŭstarantoj evidente ne aŭdigis sian voĉon per la voĉdonilo, kiel oni povas vidi el la rezultatoj ĉi-sube:

1. Forigu la ELNA-kongresojn. Okazigu nur aferkunsidojn por la estraro. Neniu voĉdono, 0,0%.

2. Okazigu la ELNA-kongresojn ĉiam en la kadro de la tiujara Universala Kongreso, en kiu ajn lando tio troviĝas. 3 voĉdonoj, 8,3%.

3. Okazigu ĉiujare aron da regionaj konferencoj. La estraro vizitu unu el ili ĉiujare por sia aferkunsido. 16 voĉdonoj, 44,4%.

4. Alternigu tutlandajn ELNA-kongresojn kaj regionajn konferencojn. 11 voĉdonoj, 30,6%.

5. Sekvu la nunan planon, t.e., okazigu ĉiujare tutlandan ELNA-kongreson. 6 voĉdonoj, 16,7%.

Guste tri kvaronoj de la voĉdonoj favoras utiligon de la regionaj konferencoj, kaj tio ŝajnas sagaca decido. El tio sekvas, ke la ELNA-Kongreso almenaŭ ĉiun duan jaron okazos en regiono, kie oni kapablas organizi regionan konferencon. Tio signifas, ke ni bezonas regionajn konferencojn!

La redaktoro ĝis nun scias pri nur du venontjaraj konferencoj. Unu okazos ĉe Whitworth-Kolegio en Spokane, Vaŝingtonio, de la 21a ĝis la 23a de junio. Ĝi ĉi-momente nomiĝas la Pacifika Nord-okcidenta Konferenco, sed ekzistas eblo ke ĝi estos ankaŭ la ELNA-Kongreso por 1974. La Kalifornian Konferencon oni intencas okazigi ekster Usono, en "Baĥa-Kalifornio" (Baja California, fakte parto de Meksikio), specife en la marborda urbeto Rosarita, dum la printempo.

Ĉu vi aŭ via grupo havas aŭ definitiv-an aŭ nebulan planon pri regiona konferenco? Se jes, tuj sciigu la redaktoron. Li povus aperigi informojn kaj eventuale eĉ kunsendi aligilon (kio ŝparos al vi iom da afranko) en la venonta numero.

#### NEKROLOGO: ARTHUR BROOKS BAKER

"Gigantoj estis sur la tero en tiu tempo.... Tio estis la fortuloj, tre famaj de plej antikva tempo." Tiuj vortoj (Genezo 6:4) enmensiĝas kiam ni funebras pioniron kiel Arthur Brooks Baker, kiu naskiĝis la 17an de aŭgusto 1877 en Salem, Kansaso, dek jarojn antaŭ la naskiĝo de nia lingvo, kaj mortis la 22an de majo, 1973, en Santa Barbara, Kalifornio.

Baker, aŭtodidakto, lernis Esperanton en 1906 kaj samjare verkis propagandan broŝuron The Elements of Esperanto kaj fondis en oktobro la unuan usonan esp-an periodaĵon, Amerika Esperantisto, kiu poste kuniĝis kun Amerika Esperantista Revuo, oficiala organo de EANA. En 1907 li tradukis Komunistan Manifeston (ne estas sciata de la redakcio, ĉu oni efektive eldonis tiun tradukon) kaj verkis tre bonan lernolibron The American Esperanto Book, firme bazitan sur la Fundamento. En 1909 li vojaĝis al la kvina U.K. en Barcelono por inviti la partoprenantaron al la sesa, kiu okazis en Vaŝingtono en 1910, kaj kie li renkontis d-ron Zamenhof.

Baker instruis vesperklason de Esperanto en Losanĝelo de 1934 ĝis 1937. Dum la sama tempo (1935-6) li estis prezidanto de la Esperanto-Klubo de Los Angeles.

Li restis vigla ĝis la fino. Ĉiutage li iris piede al sia poŝtkesto. Kiel bona oratoro, li ofte montris sian malsaton al laŭparoliloj, preferante laŭtigi la voĉon propraforte. Li ĉeestis la 56an Universalan Kongreson en Londono en 1971, kio estis nur ero de vojaĝo tra Europo. La 14an de aprilo

ĉi-jare li faris sian lastan publikan paroladon en Esperanto, ĉe la Kalifornia Konferenco en Santa Barbara.

Ni ĉiuj memoru la ekzemplon de tiu ĉi pioniro de la usona movado. Pacon al li!

#### GRAVA AGADO DE AMNESTIO INTERNACIA

Amnestio Internacia estas tutmonda organizo, kiu celas la efektivigon de la artikoloj 5, 9, 18 kaj 19 de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kaj laboras por liberigo aŭ almenaŭ humana traktado de personoj kiuj, malgraŭ tiuj artikoloj, estas malliberigitaj nur pro siaj opinioj, religio, raso, gento aŭ lingvo. Certe tiu entrepreno meritas la apogon de eĉ la plej neutralemaj esperantistoj, ĉar eĉ UEA apogas la Deklaracion de Homaj Rajtoj.

Lastatempe Amnestio komencis cirkuli peticion kiu limiĝas al la kvina artikolo de la Deklaracio: "Neniu suferu torturon aŭ kruelan, nehuman aŭ sendignigan traktadon aŭ punon." Sur la peticio tiuj vortoj vidigis en lingvoj angla, franca, hispana, rusa, ĉina kaj germana. Tio ne signifas, ke ankaŭ esperantistoj ne povos kunlabori! Se ni, pere de Esperanto, helpos cirkuli tiun internacian peticion, tio povos nur antaŭenigi ankaŭ nian aferon. Eĉ sen tio, la peticio estas subteninda. Ekzemplerojn oni mendu ĉe Amnesty International--USA, 200 W. 72nd Street, New York, NY 10023.

#### AMERIKA ASOCIO DE INSTRUISTOJ DE ESPERANTO

La usona filio de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj daŭre eldonas kvaronjaran Bultenon. Ĉiuj esperantistoj kiuj aŭ instruas aŭ intencas instrui kurson pri nia lingvo rajtas aliĝi al AAIE. La jara kotizo estas nur \$3, pagenda al American Association of Teachers of Esperanto, 5140 San Lorenzo Drive, Santa Barbara, CA 93111.

#### WALLA WALLA LAŬDITA DE LAPENNA

En Esperanto, organo de UEA, aprilo 1973, Ivo Lapenna laŭdas celtrafan agadon de la loka grupo en Walla Walla, Vaŝingtonio. Tiu organizeto sukcesas aperigi pli da informoj pri Esperanto en la loka gazetaro ol multaj nombre pli fortaj grupoj.

En la numero de julio-aŭgusto 1973 de la sama revuo, aperas artikolo pri la florida gubernio Dade, kiu fariĝis oficiale dulingva (hispana-angla) sekve de premo farita de kubaj enmigrintoj.

NOVAN KAJ UNU EL LA PLEJ KOMPLETAJ ESPERANTAJ GAZETSERVOJ  
 anoncas R. Kent Jones. Pere de S-ro Jones, vi nun povas  
 aboni iun kombinaĵon de Esperantaj gazetoj per nur unu  
 bankĉeko. Petu lian liston de 78 E-gazetoj kaj prezoj.  
 3318 N. Lake Shore Drive, N-ro 801, Chicago, Illinois 60657.

5

Usonaj ŝtatoj laŭ PIV

Legantoj de Kontakto, organo de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, ĝuas daŭran debaton en ĝiaj paĝoj pri ĝia lastjare adoptita praktiko esperantigi ĉiujn proprajn nomojn. Vilhelmo Oldo apogis la aferon, por kiu cetere li mem plurfoje argumentis antaŭ la decido de TEJO. Rajnhart Haŭpental kontraŭstaris, deklarante ĝin "afero de abderitoj." Oldo konfesis en sia respondo, "Eble estas por mi bone, ke mi ne scias, kio estas 'abderito'!" Du ELNA-anoj aŭdigis sian voĉon: Bun-Cambro varme apogante la principon en sia "Deklaracio de nepoligloto," kaj Fortkasko Agordo (nacinome William Harmon!) avertante, sen rekte kontraŭstari, pri malfermo de "skatolo de vermoj."

Ĉion-ĉi la redaktoro mencias ĉar li, kiel dudekunujara UEA-ano, estas vole-nevole ankaŭ ano de TEJO. Li tamen ne intencas apliki la principon de esperantigo senescepte, sed proponas, ke esperantaj formoj estu uzataj kiam ili jam ekzistas kaj estas pli-malpli klare rekoneblaj. Do interalie li intencas uzi en ĉi tiu eldonaĵo esperantajn formojn por ĉiuj usonaj ŝtatnomoj. Pro tio, ke ne ĉiuj ELNA-anoj scias tiujn formojn, li ilin listigas ĉi-sube, kiel ili aperas en la granda normverko Plena Ilustrita Vortaro, laŭ la angla alfabeto ordo:

Alabama: Alabamo	Maine: Majno
Alaska: Alasko	Maryland: Marilando
Arizona: Arizono	Massachusetts:
Arkansas: Arkansaso	Masaŝuseco
California: Kalifornio	Michigan: Miĉigano
Colorado: Koloradolando	Minnesota: Minesoto
Connecticut (mankas)	Mississippi:
Delaware: Delavario	Misisipio
Florida: Florido	Missouri: Misurio
Georgia: Georgio	Montana: Montano
Hawaii: Havajlando	Nebraska: Nebrasko
Idaho: Idaho	Nevada: Nevado
Illinois: Ilinojso	New Hampshire:
Indiana: Indianio	Nov-Hampsiro
Iowa: Iovao	New Jersey:
Kansas: Kansaso	Nov-Jerzejo
Kentucky: Kentukio	New Mexico:
Louisiana: Luiziano	Nov-Meksikio

New York: Nov-Jorkio	Texas: Teksaso
North Carolina:	Utah: Utaho
Norda Karolino	Vermont: Vermonto
North Dakota: Norddakoto	Virginia: Virginio
Ohio: Ohio	Washington:
Oklahoma: Oklahomo	Vaŝingtonio
Oregon: Oregonio	West Virginia:
Pennsylvania: Pensilvanio	Okcidenta
Rhode Island: Rod-Insulo	Virginio
South Carolina:	Wisconsin:
Suda Karolino	Viskonsino
South Dakota:	Wyoming:
Suddakoto	Vajomingo
Tennessee: Tenesio	

Rimarku, ke aldoniĝas la ŝajne superflujaj finaĵoj "-io" kaj "-lando" al kelkaj nomoj. Tio ne estas semmotiva. Kolorado, Delavaro, Misisipo, Misuro kaj Oregonio estas riveroj; Havajo estas nur unu el la Havajaj Insuloj, kiuj kune formas la ŝtaton Havajlando; indiano jam estas ano de amerika gento; Nov-Jorko kaj Vaŝingtono estas urboj. La ŝtataj nomoj do iomete diferenciĝas en Esperanto, eĉ se ne en la angla. "Nov-Meksikio" evidente devenas de "Meksikio," formo kiun Privat siatempe nomis "tute ne internacia kaj eĉ iom monstra," sed kiu estas oportune distingebla de la urbonomo "Meksiko."

Ĉe la ortografioj "Masaŝuseco" kaj "Miĉigano" evidentiĝas konfuzo pri la sonoj de la angla digramo ch. Ĉi redaktoro pretas oferi la fonetisman ĝustecon al la lingva normigo kaj esperas, ke la masaŝusecanoj kaj miĉigananoj opinias same.

Kial "Norda Karolino" kaj "Suda Karolino," sed "Norddakoto" kaj "Suddakoto"? Ĉu ĉi-lastaj pli facile elparoliĝas?

Por malhelpi konfuzon inter la usona ŝtato Georgio kaj la sovetia respubliko fojfoje samnoma, PIV proponas por tiu lasta la formon "Gruzujo" (ne ujo por gruzo!). Simile oni diferenciĝas la usonan federacian distrikton Kolumbio disde la sudamerika nacio Kolombio, kvankam ambaŭ ja nomiĝas pro la granda Kristoforo.

Kial mankas "Connecticut"? Ŝajne la sola loko, kie tio troviĝas, estas The Esperanto-English Dictionary de Joseph Rhodes (1908). La tiea formo estas "Konektikuto."

TOMO III, "LINGVISTIKO," APERIS  
raportas R.E.Wood

En aŭgusto 1973 aperis tomo III, "Lingvistiko," de 1971 MLA Abstracts of Articles in Scholarly Journals, internacia rekonata kolekto de mallongaj anglalingvaj resumoj pri artikoloj aperintaj en sciencaj revuoj: ĉi-foje 569 resumoj el revuoj de la jaro 1971 kaj la fino de 1970. La tomon eldonis la Usona Asocio pri Modernaj Lingvoj.

La divido laŭ la originala lingvo de ĉiu artikolo estas jene: angla, 412; rusa, 42; germana, 39; franca, 28; hungara, 10; rumana, 8; ukraina, 7; hispana, 7; itala, 7; ĉeĥa, 3; finna, 3; bulgara, 2; slovaka, 1.

Notinde estas, ke tiel gravaj lingvoj kiaj la portugala (100 milionoj da parolantoj) kaj la lingvoj de pluraj ekonomie kaj science progresintaj landoj kiel la sveda, dana, serbokroata, pola kaj nederlanda eĉ ne unufoje aperis.

La resumitaj artikoloj originale aperis en 235 revuoj en lingvoj eŭropaj aŭ eŭropdevenaj. Revuoj en ekstereŭropaj lingvoj kiel la ĉina, japana ne estis konsideritaj; sed la artikoloj temis pri lingvistikaj aspektoj de ĉiuj lingvoj, ankaŭ ne-eŭropaj, aŭ pri ĝenerala lingvistiko. La granda plimulto da anglalingvaj artikoloj certe parte ŝuldiĝas al la fakto, ke la studo estis eldonita kaj kompilita en usono.

#### LA REDAKTORO DE LA ELNA-NEWSLETTER

kaj nun ankaŭ helpetredaktoro de la ELNA-Bulteno, Riĉard Sandberg, sugestas ke ELNA elspezu pli grandan parton de la membrokotizoj por la produktado de tiuj du eldonaĵoj. Kiam li akceptis la redaktorecon de la Newsletter, la antaŭa redaktoro skribis al li ke la budĝetlimo por tiu eldonaĵo por la tuta jaro estas \$500, inklusive preskostajn kaj poŝtaĵon, kaj ke la budĝetlimo de la Bulteno samas. Demandoj pri ĉu tiuj estas vere oficialaj limoj ne ricevis respondojn. Kiam temas pri mil ekzempleroj, tia budĝeteto sufiĉas nur por pagi la preskaj poŝtkostojn kaj ne permesas la dungadon de kompetantaj helpantoj. Do, la aperado de la Newsletter kaj la Bulteno dependas plejparte je la libertempo de la redaktoroj.

S-ro Sandberg sugestas ke ELNA elspezu \$2400 ĉiujare por aperigi ambaŭ eldonaĵojn ĉiumonate. Tiakaze, li povus pagi redaktortajpistinon \$100 ĉiumonate por proksimume 35 horoj da laboro kaj li mem povus doni pli da tempo al verkado de la enhavo. Tio

ne necese signifus ke la eldonaĵoj estus pli belaj aŭ pli imponaj, sed ĝi garantius ke ili aperus regule kaj sufiĉe ofte. Alternative, li sugestas ke ĉiujare \$3,50 el la kotizo de ĉiu membro iru en specialan konton por la du eldonaĵoj. "Kio estas pli grava al organizaĵo kiel ELNA ol eldonaĵoj?" li demandas.

Li ankaŭ sugestas ke la Newsletter enhavu nur aferojn kiuj plej probable allogos neesperantistojn kaj nur la Bulteno enhavu (inter aliaj aferoj) detalojn pri internaj aferoj, nekrologojn ktp., kiuj interesos nur ELNA-anojn. Tamen, li sekvas la deziron de la estraro. Li favoras la daŭran aperadon de la du eldonaĵoj aparte, la Newsletter enhavante unu artikoleton aŭ almenaŭ kelkajn vortojn en Esperanto--sufiĉe por montri al neesperantistoj kiel aspektas Esperanto, sed ne sufiĉe por enuigi ilin. "La Bulteno, aliflanke, restu tuteŭropea por montri ke Esperanto plene taugas kiel lingvo," li urĝas.

#### NOMREGISTRA DISKRIMINACIO EN BRETONUJO

Bretona patrino de dek du infanoj, s-ino Le Goarnic, pledis al la Europa Konsilantaro (Strasburgo) kaj al la Internacia Kortumo (Hago) kontraŭ diskriminacio, jam de dekjara daŭro, fare de la registaro de Francujo.

Laŭ la franca leĝo pri sociala asekuro, ses el la infanoj de s-ino Le Goarnic rajtas al ŝtata financa subteno. Tia subteno estas donata nur al infanoj oficiale registritaj kiel naskitaj. Sed laŭ dekreto de la Publika Prokuroro de Francujo, bretonaj antaŭnomoj estas neakcepteblaj kaj ne-registreblaj. Same netolerataj estas la antaŭnomoj de ĉiuj aliaj subpremitaj naci-malplimultoj en Francujo, t.e. ĉefe vaskaj, katalunaj, provencaj, okcidentflandraj kaj alzacgermanaj.

La antaŭnomoj de la infanoj, belsonaj kaj poeziaj (Adraboran, Maiwenn, Gwendal, Diwezha, Sklerijenn kaj Brann) fontas el la jarmila kulturo de la kelta popolo. Sed post frustrigaj aperoj antaŭ kortumoj en Kemper (franclingve Quimper) kaj la Apelacia Kortumo en Roazhon (france Rennes) kaj same sensukcesa apelacio al la Prezidanto de la Respubliko, la Franca Ministerio de Justico insistas, ke la leĝo dekretu aliajn nomojn por siaj infanoj. La bretonino tion kategorie refetas.

La Eŭropa Konsilantaro petis la batal-  
antan s-inon LeGoarnic prezenti studon pri  
"la subpremado rilate al la malplimultoj  
ĝenerale kaj la gento LeGoarnic aparte."

La Dangaera Lingvo: Esperanto en la uragano  
de persekutoj, Ulrich Lins. L'omnibuso.  
Kioto, 1973. 67p. \$1.95.

recenzas Karl Pov

Ofte aŭdiĝas la demando: "Se Esperanto  
estas fakte tiel bonega afero, kial ĝi ne  
pli progresis?" La respondo ne estas  
simpla. La esperantistoj ne sufiĉe propa-  
gandas, kelkfoje eĉ mispropagandas, kaj  
kontraŭ eĉ la plej bona propagando staras  
tiu plej fortika barilo kontraŭ ĉia ajn  
progreso: la indiferento. Sed kvankam la  
indiferento estas la plej konstanta el niaj  
malamikoj, fojfoje aperas aktiva persekut-  
ado kontraŭ nia lingvo, persekutado farita  
de maldemokratiaj registaroj, kiuj vidas,  
ne sen motivo, ke por ili Esperanto estas  
"la dangaera lingvo."

Tiu ĉi mallonga sed detala priskribo  
informas pri la persekutoj ekde la cara  
cenzuro de La Esperantisto pro aperigo de  
traduko el Tolstoj ĝis la reviviĝo de la  
movado post la reĝimo de Stalin.

La du plej ampleksaj ĉapitroj estas  
"Lingvo de judoj kaj komunistoj" kaj "Lin-  
gvo de cionistoj kaj kosmopolitoj," pri  
respektive la faŝisma kaj stalinisma terror-  
oj. Kontrasto inter la du evidentiĝas.  
Hitler principe malamis Esperanton, skrib-  
ante en Mein Kampf ke la judo, fariĝinte  
mastro super la aliaj popoloj, trudos al  
ili universalan lingvon, "ekz. Esperanto!"  
(Tiu citaĵo troviĝas sur p. 307 de la usona  
eldono.) La sekvantoj de Hitler do batalis  
kontraŭ Esperanto mem. Aliflanke, sub  
Stalin, la persekutado okazis ne pro prin-  
cipaj konsideroj, sed pro la fakto, ke la  
sovetiaj esperantistoj ĝuas suspektindajn  
kontaktojn kun la nekomunisma eksterlando.  
Tute same sub tiu reĝimo okazis persekutoj  
kontraŭ kolektistoj de poŝtmarkoj.

La ĉapitro pri la Tria Regno estas  
kompletigo de la pli frua eseo de Lins,  
"Esperanto dum la Tria Regno," kiu aperis  
en Sennacieca Revuo n-ro 96 (mendebila de  
nia libroservo, 50¢). La eseo prilumas la  
evoluon interne de la movado, precipe la  
konflikton inter la t.n. "neutrala" landa  
asocio de Germanujo kiu tamen pli kaj pli  
kompromitis sian neutralecon por konservi

sian ekziston, kaj la rivala, malkaŝe nazia  
asocio. La ĉapitro en la nuna libro kon-  
cernas la evoluon de la sinteno de la reg-  
istaro, kiu finfine abolis ambaŭ asociojn.

El lingva vidpunkto: La neologismoj  
"legala" (laŭleĝa) kaj "ilegala" (kontraŭ-  
leĝa) ŝajnas forĵetindaj. Interesa por via  
recenzisto estis la uzado de "ĝis" por es-  
rimi limdaton (angle by kiel en "I'll finish  
it by Friday"). Tiu uzado, kvankam iom ne-  
kutima, estas tamen zamenhofa.

Jen eble la plej grava primovada libro  
dum multaj jaroj, necesajo por ĉiu konscia  
antaŭeniganto de nia afero.

Ĉiujn mendojn adresu al Esperanto Book  
Service, P.O.Box 508, Burlingame, CA 94010.  
Aldonu 25¢ al mendoj sub \$5.00.

SENPAGA AKTIVECO ĈE BIBLIOTEKOJ

D-ino Maria Liwzyc, kiu nun logas en  
Fall River, Masasuseco, atentigas pri ebleco  
tute senpage helpi al la movado. En preskaŭ  
ĉiu urbo ekzistas ia societo "Amikoj de la  
Biblioteko," kiu helpas diversrilate al la  
urba biblioteko kaj ĝiaj klientoj. Unu el  
la aktivecoj de "Amikoj de la Biblioteko"  
estas, kompreneble, rekomendo de aĉetindaj  
libroj.

Kelkfoje ni, kiel unuopuloj kaj kiel  
klubo, havas amaran sperton ĉe biblioteko  
kiam temas pri donaco de esperantaĵoj. Post  
akcepto de la donaco, la biblioteko forĵetas  
la ofte tre valorajn esperantajn librojn.  
Sed se ni povus instigi al la bibliotekoj  
mem aĉeti, tio unue signifas, ke ni ŝparos  
al ni konsiderindan monsumon, kaj due, ke la  
biblioteko verŝajne konservos tion, kion ĝi  
aĉetis. Do ni ĉiuj ekaktivu en "Amikoj de  
la Biblioteko," por ke la biblioteko estu  
amiko por ni!

MARJORIE BOULTON VENAS AL USONO

En septembro, Marjorie Boulton, aŭtor-  
ino de Eroj, Virino ĉe la landimo, Zamenhof:  
Aŭtoro de Esperanto kaj pluraj aliaj gravaj  
libroj, alvenos al Usono por proksimume tri-  
monata studado ĉe Princeton-Universitato en  
Nov-Jerzejo. Grupoj en la nordorienta reg-  
iono de Usono profitu la okazon! Invitu ŝin  
al via kunveno. Ŝi eble eĉ komplezos per  
prelegeto, kaj ŝi havas sur tiu kampo tre  
bonan reputacion. Oni pretu provizi vetur-  
ilon ĉar si verŝajne ne disponos aŭton en  
usono. Interesatoj kontaktu la redaktoron.

## ANONCETOJ

E-poeto D. Kolker kontraŭ cent uzitaj poŝtmarkoj sendas aŭtografon de sia versaĵo. Ankaŭ, luksa memoraĵo de ukraina urbo Zaporozĵje--la ridiga pupo-skatolo "Zaporozĵja kozako"--tre sukcesis en Montreala Mondekspozicio. Kiu volas ĝin ricevi, bv. sendi cent belajn usonajn pm. (eĉ uzitajn) al s-ro Danielo Kolker, 330058--Zaporozĵje, S-Kolcevaja 20/149, Sovetunio. Validas ĉiam.

Atentu portlandanoj kaj kongresintoj 1972! Filatelisto serĉas ekzemplerojn sur kovertoj/pk. de la aŭtomata maŝinstampo vaste uzita en pluraj urbaj poŝtoŝtancoj de Portlando dum monato antaŭ UK 1972: "Portland Welcomes Esperanto Congress." Ili ekzistas

multmilkvante. Ofertas tujan pagon d-ro Richard E. Wood, Dept. of Foreign Languages, Louisiana State University, Baton Rouge, LA 70803.

28-jara poŝtisto volas korespondi pri fotografio, kolomboj kaj futbalo. S-ro Penko Kolev, Stara Zagora, Mineralni Bani, Bulgario

26-jara geografo volas korespondi pri geografio, historio, kino, turismo kaj aliaj temoj. S-ro Andrzej Wegner, 87-720 Ciechocinek, ul. Woluszevska 5, Pollando. Interesiĝas precipe pri Kalifornio.

Volas korespondi pri spirito scienco, novaj ismoj kaj vivmanieroj, lingvistiko, fantazia literaturo kaj fantaziaĵoj S-ro Ludger Goutard, 94 Rue de Sarge, 7200 Le Mans, Francujo.

# El Popola Ĉinio

Esperanta Monata Ilustrita  
Specimeno akirebla senpage  
ABONTARIFO: 1 jaro \$2.20  
2 jaroj \$3.30  
3 jaroj \$4.40

ABONU ĈE: Esperanto Book Service  
P. O. Box 508  
Burlingame, CA 94010



**ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA**  
Post Office Box 275  
Fox Lake, Illinois 60020, U.S.A.

Nonprofit Organization  
U.S. POSTAGE  
**PAID**  
Fox Lake, Ill.  
Permit No.32

Address Correction Requested